# la Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Vintro de 1989-90. Nro 17a. Jarkolekto 4a. 0,75 $

## Akceptindo kiel ĉefa kriterio

**En juin dernier a eu lieu à Proprad, en Slovaquie, un séminaire du Centre espérantiste de terminologie. Edmond Brent, terminologue à l'Office de la langue française et responsable du séminaire, y a entre autres introduit l'acceptabilité comme principal critère terminologique.**

La unikan signifon de la unua terminologia seminario de la Terminologia Esperanto-Centro ( TEC ), kiu okazis en Poprad, Slovakio, meze de junio, substrekis la aktiva partopreno de Klaus Schubert ( DLT ), Regina Thaller ( TermNet ), kaj precipe la ĉeflektoro Edmond Brent, profesia terminologo ĉe Office de la langue française. En pensigaj kaj viglaj diskutoj partoprenis 19 homoj el naŭ landoj.

Dro Brent alportis nekutiman trejnmetodon, nomatan « perproblema lernado ». Du grupoj de gelernantoj elektis subtemon el la fakoj kemio kaj informadiko, kaj sisteme pritraktis ĝian nociaron dum kvar posttagmezoj. La studentoj devis kvazaŭ « mendi » de la lektoroj informojn, ekzercojn, eĉ prelegojn pri temoj, kiuj helpus klarigi la renkontitajn problemojn kaj alporti solvojn. Estis ne nur permesate sed eĉ dezirate, ke oni intervenu per demandoj kaj por defendi la proprajn opiniojn. Inter la traktitaj temoj troviĝis « Ambiguo — difino kaj solvoj », « Dokumentado en terminologio », « Terminologiaj principoj », « Terminologia normigado » kaj « Akceptigo de terminaroj ». Precipe ĉe la lasta temo evidentiĝis la profunda kaj ampleksa teoria scio kaj praktika sperto de la ĉeflektoro. La plurdimensia taskaro de akceptigo devas komenciĝi per detalaj esploroj pri la bezonoj de la uzontoj, kaj povas finiĝi nur post definitiva stabiliĝo de la ŝanĝoj ĉe la uzantojn. ( Pri « akceptindo » kiel ĉefa kriterio en Ensperanto oni ĝis nun ne multe cerbumis. )

[ Laŭ *Esperanto,* oktobro de 1989 ]

## Nova prezento

Denove la prezento de *la Riverego* pliboniĝis. Malnovaj membroj certe memoras la unuajn numerojn, tajpitajn. Poste venis komputilo, kiun la redaktanto iom post iom regis. Nun, dank'al laser-presilaj litertipoj evoluigitaj por U.E.A., vi certe povas legi pli facile kaj pli bele.

Cetere, la venonta numero estos verŝajne eĉ pli bela. Mi ŝatus, ke grupeto de samideanoj kunsidu kun mi kaj elpensu novan prezenton, kun la nun alireblaj eblecoj. Tiuj homoj povus eĉ poste konsistigi redaktan komitaton. Krome, ege **bezonatas bildoj kaj eble eĉ fotoj.** La redaktanto ne povas ĉion fari sola.

## Nouvelle présentation

Encore une fois, la présentation de *la Riverego* s'est améliorée. Les anciens membres se souviennent sans doute des premiers numéros, tapés à la machine. Par la suite, un ordinateur a peu à peu changé la situation. Maintenant, grâce à des jeux de caractères pour imprimante laser, développés pour l'Association mondiale d'espéranto, le texte est plus beau et plus lisible.

Et le prochain numéro devrait être encore mieux. J'aimerais qu'un petit groupe se réunisse pour créer une nouvelle présentation, qui tienne compte des possibilités d'une imprimante laser. Ce groupe pourrait même devenir un comité de rédaction. En outre, nous avons **un grand besoin de dessins et peut-être même de photos.** Le rédacteur ne peut pas tout faire à lui seul.

## Klaĉo

*La Riverego* aŭdis, ke Denise Richard, Sylvain Bélisle kaj ilia filino Gabrielle denove forflugos al la Chaux-de-Fonds, en Svislando, kie ili jam loĝis kaj laboris dum kelkaj monatoj, sed de kie ili revenis por naski Gabriellan ĉi-tie. Ili nun intencas resti tie dum kelkaj jaroj. La tiea Kultura Centro Esperantista vokis ilin : Sylvain anstataŭos la kuiriston, kiu jam demisiis. Ventro vokas…

Ili tie revidos la kuzon de Sylvain, Mario Lépine, kiu ankaŭ dejoras en K.C.E., verŝajne ĝis aprilo.


**la Riverego**

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 300.
ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.
Premier trimestre 1986.
Redaktis: Sylvain Auclair.
Kunlaboris Suzanne Bolduc, Normand Fleury, Claude Lebuls, Patrice Mongeau kaj Cyrille Robidoux.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 $ por mara sendo; 6 $ por aera sendo.
UEA-kodo: kebk-d.
Unuopa numero: 0,75 $, plus sendokostoj.
Limdato por la venonta numero : 1-a de marto de 1990.



Adreso: Esperanto-SocietoKebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal,Québec
KANADO H2G 3C8

telefono: (514) 272-0151

# Nova esperanta komunikilo: la Papago

Depuis le 2 octobre, les espérantistes montréalais peuvent écouter *la Papago* ( le Perroquet ), journal quotidien, espérantiste et téléphonique. Chacun peut le joindre au (514) 270-0054. À la fin du journal, l'auditeur est invité à laisser son nom ou pseudonyme, et aussi à contribuer pour l'édition du lendemain. Ça ne s'appelle pas *la Papago* pour rien ! Une dizaine de personnes écoutent maintenant les nouvelles, les entrevues et les débats de *la Papago*. L'éditeur, Patrice Mongeau, attendra le 100e numéro avant de décider s'il vaut la peine de continuer. Dix personnes ne suffisent pas vraiment.

En la pasinta eldono de *la Riverego,* vi povis legi pri *la Papago*. Ĝi estas ideo de Patriko Monĵo, kiu oficiale ekfunkciis la duan de oktobro. Temas pri ĉiutaga telefona gazeto, kiu jam transpasis sian 50an numeron.

Laŭaspekte, *la Papago* tre similas telefonan respondilon. Sed la mesaĝo ŝanĝiĝas ĉiutage. Homoj telefonas ĝin ( la numero estas (514) 270-0054 ) kaj povas lasi sian nomon aŭ kaŝnomon, salutojn, aŭ pli longan kontribuon, kiu estas *papage* redirota la postan tagon. Tamen multaj lasas nenion.

La mesaĝoj sekve entenas la hieraŭajn kontribuojn, se estas, kaj komentojn de la eldonisto, kiu foje devas mem elparoli la tutan programon, kiam mankas kontribuoj. La aparato ne akceptas kontribuojn pli-ol-tri-minutajn, sed eblas telefoni plurajn sinsekvajn fojojn, por meti pli longan tekston. Johano Sorel jam legis, en kelkaj tagoj, tutan novelon.

## Kelkopa diskutado

Nuntempe meze dekon da vokoj ricevas tage *la Papago*. Inter tiuj, kvar pli malpli regule kontribuas : Johano Sorel, Frato Teo ( oni rajtas uzi kaŝnomon ), Sro Zilbernik, kiu asertas esti prezidanto de la Esperanto-Klubo de Beaconsfield kaj Baie-d'Urfé ( la redaktanto tre forte dubas pri la ekzisto de tiu Sro Zilbernik, kaj same pri la ekzisto de tiu de neniu konata klubo…) kaj Silvano Auclair. Kelkaj aliaj simple diras sian nomon, dum kelkajn vokantojn neniu povas identigi. Iuj ankaŭ telefonas neregule : Damir Metz-Fleury ekzemple vokis *la Papagon* unu aŭ du fojojn, eble eĉ pli.

Pri kio parolas la Papago ? Iome pri ĉio, ĉu rilata al Esperanto, ĉu ne. Ĝi jam respondis gramatikajn demandojn. Aŭ anoncis aŭ raportis pri Esperantaj eventoj : MEK-vesperoj, ESK-renkontiĝoj. Sed ĝi ankaŭ pritraktas aktualajn temojn de la ĉiutaga vivo : leĝo pri abortigo, reformo de la franca aŭ de la angla ortografio, lingva situacio en Kanado kaj Kebekio. k.s.

> **Teknikaj komentoj**
>
> La telefonnumero de *la Papago* ( 270-0054 ) estas laŭ la sama telefonlinio kiel tiu normala de Patriko Monĵo. Ĝi estas dua telefonnumero, nova servo ofertata de Bell Canada. La dua numero havas duoblan sonoron, tiel ke oni tiam rekonas la celon de la voko kaj lasas respondi la aparato.Tamen, se neniu ĉeestas, la aparato respondos ĉiajn vokojn. Tial la respondilo ankaŭ foje utilas kiel ordinara hejma respondilo, kaj tial ankaŭ estas mesaĝo en la franca komence de ĉiu eldono de *la Papago*.

Foje tiuj temoj naskas debaton inter la aŭskultantoj, kio povas daŭri plurajn tagojn.

Krome, *la Papago* foje aŭdigas intervjuojn, same kiel radiostacio. Ĝis nun sep homoj estis intervjuataj, ĉefe Esperantistoj vizitantaj Montrealon, aŭ vizitataj de Patriko Monĵo, eldonanto de *la Papago*. Ili venis de Kebekio, de Kanado, de Usono kaj eĉ de Francio. Patriko baldaŭ iros al Britio, kaj verŝajne eĉ

ĉeestos la Zamenhofan feston de la Londona Esperanto-Klubo. Aŭskultu *la Papagon* kaj aŭdu la tiam farotajn intervjuojn.

### Celoj, ĉu plenumitaj ?

Per la Papago, Patriko esperis interalie « vigligi la movadon, provizi okazon aŭdi Esperanton, oftigi la uzon de Esperanto kaj provizi okazon al ĉiu paroli kaj esti aŭskultata ». Ja la ebleco ĉiutage aŭskulti Esperantaĵon estas nun ofertata al la tuta Montreala Esperantistaro ( kaj eĉ al aliaj, se ili pretas pagi la vokon ). Tamen tre malmultaj uzas tiun eblecon. Kial do ? Ĉu estas en Montrealo tiom malmulte da Esperantistoj ?

La nunaj aŭskultantoj tamen konsistigas pli vivan Esperanto-komunumon. Tio povas estiĝi nur per komunaj travivaĵoj kaj interparolado, kaj *la Papago* ebligas multe pli oftan interparoladon ol, ekzemple, la Montreala Esperanto-Klubo. Dum la pasinta restoracia MEK-vespermanĝo, la Papaganoj parolis inter si pri tio, kion ili aŭskultis dum la pasintaj tagoj. La aliaj partoprenantoj ne komprenis ĉiujn ŝercojn, bedaŭrinde... por ili.

En la komenco, Patriko pensis pri semajnaj konstantaj rubrikoj, kiel *movadaj informoj, por komencantoj,* k.s. Tio ne realiĝis.

### Pri la estonteco

Ĉu *la Papago* daŭros longe ? Tion povas respondi nur la eldonanto. La mono kaj tempo bezonata ne estas troaj : la kroma telefona numero kostas nur 4 $ monate, la respondilon li ne enkalkulas, ĉar li verŝajne ĝin konservos por propra uzo, kaj, rilate la tempon, li bezonas meze po duonan horon tage, po ses tagojn en semajno. Cetere, *la Papago* jam ricevis tute ne petitajn mon-kontribuojn, entute 59 $...

La ĉefa problemo kuŝas en la nombro de la aŭskultantoj. Deko da ĉiutagaj vokoj ne vere pravigas tiom da laboro. Kompreneble, oni ne povas atendi lavangon de la unua tago. Tial Patriko intencas atingi la centan numeron, iam fine de januaro, kaj tiam rekonsideros la aferon. Se la aŭskultantaro ne estos kreskinta, *la Papago* verŝajne silentos.

Tamen la ideo ŝajnas tiom bona ke ĝi eble disvastiĝos. Jam Manŭelo, en Otavo, pensas pri simila afero, kaj jam trovis nomon : Eĥo.

---

# De par le monde

Cyrille Robidoux

### L'espéranto enseigné en Israël

En Israël, et principalement à Tel Aviv, l'espéranto est enseigné dans quelques classes d'enfants plus doués que la moyenne. Dans une lettre-circulaire adressée à l'association israélienne des enseignants, le ministre de l'éducation a souligné l'importance et l'utilité de l'enseignement de l'espéranto.

### L'espéranto, matière obligatoire

Durant les trente dernières années, 10 000 élèves des écoles d'apprentissage de Pirot ( Yougoslavie ) ont appris l'espéranto comme matière obligatoire dans le cadre d'une centaine de cours. Ouvert à l'initiative du professeur J. Pavlovic, cet enseignement a été officialisé par la commission scolaire locale.

### Nouveau musée d'espéranto

Un nouveau musée d'espéranto a été inauguré le six décembre 1988 à l'Université hébraïque de Jérusalem ( Esperanto-Muzeo, Hebrea Universitato, Bejt Hillel, IL-91905 Jérusalem, Israël ).

### Centenaire de l'espéranto

La Yougoslavie est le huitième pays qui ait commémoré le centenaire de l'espéranto par l'édition d'un timbre-poste de 600 dinars.

## Nouvelle revue moscovite en espéranto

Un premier numéro des « Nouvelles de Moscou » vient de paraître en espéranto ; la publication régulière de cet organe de presse en espéranto pourrait être envisagée suivant l'écho que recevra cette initiative.Écrire en espéranto à : Sro Jakovlev, Redaktoro de « Moskvaj Novaĵoj », str. Gorkij 16/2, SU-103829 Moscou, Union Soviétique.

## L'espéranto dans les assurances

La compagnie hongroise d'assurances Atlas, de Budapest, utilise aussi l'espéranto pour les contrats d'assurances des voyageurs étrangers. Les conditions sont imprimées en cinq langues dont l'espéranto. Les formulaires peuvent être reçus dans tous les bureaux de voyages IBUSZ et toutes les filiales de la compagnie étatique d'assurances.

# Okazos ie en la mondo...

Quelques évènements espérantistes de la prochaine année. Beaucoup d'activités pour les jeunes. Spécialement pour les débutants : cours à l'Université de San Francisco.

**Dum la jarŝanĝa semajnfino,** okazos po du renkontiĝoj en Hungario ( Vintra Esperantista Ferio kaj 19a Vintra Esperantista Feriado ) kaj en Federacia Germanio ( 6a Internacia Festivalo kaj 33a Internacia Seminario ), kaj unu en Pollando ( 5a Silvestra Esperanto-Renkonto ).

**En januaro 1990,** meze de somero ( ?! ), okazos Esperanto-Kongresoj en Novzelando kaj Aŭstralio. Nun vi komprenas, ĉu ne ? Okazos ankaŭ konferenco pri Trafiko kaj Medioprotekto, en Hungario, fine de l' monato. Ĉi-foje dum vintro...

**Dum Pasko,** okazas samtempe du junularaj aranĝoj : 14a Internacia Junulara Festivalo, en norda Italio, kaj Paska Junulara Renkontiĝo, en Nederlando.

**La Somera kursaro** ĉe la Universitato de Sanfrancisko okazos de la 18a de junio ĝis la 6a de julio.

**La du grandaj kongresoj** estos en Nord-Ameriko, en Kubo. La 75a Universala Kongreso estos en Havano, de la 14a ĝis la 21a de julio. Tuj poste, de la 21a ĝis la 28a, gejunuloj iros al Playa Girón, por la Internacia Junulara Kongreso.

Sed ne ĉiuj gejunuloj. Samtempe kiam la I.J.K., estos en Finnlando la Kvinpinta Semajno, organizata de Skandinavaj gejunuloj. Verŝajne tie estos multaj Eŭropanoj.

**Informoj haveblaj** ĉe la Esperanto-Societo Kebekia.

## La iĝanta mondo

La unuaj tutmondismaj kunsidoj « La iĝanta mondo » okazos en Francio, en la urbo Turo, de la 24a ĝis la 28a de aprilo 1990.

Iniciitaj de la Mondcivitanoj, ili konsistigos tribunon de la diversaj sento-kapablaj de nia planedo tuŝantaj **pacon, disvolviĝon, ekologion kaj demokration.**

Kun multa publiko kaj la internacia gazetaro, aktivaj asocioj kaj eminentuloj — kelkfoje famaj — ne nur francaj, strebos al evidentigo de sia konverĝo al entuta alternativo pri la aktuala stato de la mondo, kiu prezentiĝas dispartiga, malorganiza, maldisvolviĝa, perforta, malpuriga,danĝerega,malcerta.

Tiuj kunsidoj deziras esti atesto pri la elmergiĝo el la tutmonda civila socio kontraŭ la ekonomiaj kaj ideologiaj potencoj kaj kontraŭ la ekcesoj de suvereneco de la ŝtatoj.

Ili ankaŭ deziras esti katalizilo de la ekkonscio de nia tutmonda civitaneco.

Pliaj informoj ĉe la Esperanto-Societo Kebekia.

## Le monde en devenir

Le comité organisateur des premières assises mondialistes *Le monde en devenir* invite les espérantistes québécois à Tour ( France ), du 24 au 28 avril 1990. Renseignements supplémentaires disponibles auprès de la Société québécoise d'espéranto. De la documentation est aussi disponible en français et dans quelques autres langues.

## Antaŭmendo por la nova kasedo de Amplifiki

Eble vi jam aŭdis la unuan kasedon de la grupo, ĉeestis la koncerton, aŭ nur scivolemas pri *Amplifiki*. La kasedo *Tute ne gravas,* eldonita en 1986, estis unua provo, tamen ĝi vendiĝis sufiĉe multnombre. De tio la grupo gajnis nenion monan, sed evoluis kaj maturiĝis por veni al emo fari duan kasedon, kaj 2-kantan diskon ( kune kun alia grupo ).

Ni plenas je entuziasmo, sed ni ja bezonas tuj monon, ĉar ni celas fari bonkvalitan profesinivelansurbendigadon.

DO rezervu jam nun kasedon aŭ diskon, estu el la unuaj, kiuj aŭskultos ĝin !

Amplifiki : Mikke, Isabelle, Perola, Marc, Aline

45-Disketo kostas 20 francajn frankojn, kasedo kostas 50 FF. Mendu ĉe Aline Boulet, 8, Villa Stendhal, F-75020 PARIS, FRANCE.

Réservez dès maintenant la deuxième cassette du groupe rock espérantiste franco-suédois Amiplifiki. Aussi disponible : un 45 tours, regroupant des chansons d'*Amplifiki* et de *Rozmariaj beboj*. Le disque coûte 20 francs français, et la cassette, 50 FF. Commandez à l'adresse ci-dessus.

# L'association mondiale d'espéranto

Rapida prezento de la Universala Esperanto-Asocio al la Amikoj de Esperanto. Invito iĝi individua membro.

L'association espérantiste la plus importante est sans contredit *Universala Esperanto-Asocio,* l'association mondiale d'espéranto, dont le siège est à Rotterdam, aux Pays-Bas. Certains espérantistes lui reprochent même de prendre trop de place !

U.E.A. compte près de 50 000 membres et peut être considérée comme le centre du mouvement espérantiste mondial. Son siège social tient la plus grande librairie espérantiste au monde et organise le congrès mondial annuel. L'association s'occupe aussi des relations avec l'ONU, l'UNESCO et d'autres organisations internationales.

On peut être membre de U.E.A. de deux manières. Tout d'abord, puisqu'il s'agit d'une fédération, tous les membres de la cinquantaine d'associations nationales affiliées à U.E.A — comme l'association canadienne d'espéranto — sont membres associés d'U.E.A. Cinq associations à vocation spécifique ( art, aveugles, cheminots, médecine et science ) sont aussi liées à U.E.A. de la même façon.

L'autre manière est de devenir membre individuel d'U.E.A. Celui-ci paie directement une cotisation à U.E.A. et en reçoit directement des services : le *Jarlibro,* présentant les organisations du mouvement espérantiste et les délégués d'U.E.A. ; *Esperanto,* revue mensuelle d'U.E.A.

Il en coûte 45 $ par an pour être membre individuel d'U.E.A. Ceux qui ne veulent pas recevoir *Esperanto* ne paient

# Demandaro Questionnaire

Por pli bone koni siajn membrojn kaj iliajn volojn, kaj por ebligi rilatojn de saminteresaj homoj, jen ni invitas vin plenigi tiun etan demandaron. Bonvole respondu ĝis la fino de januaro. Ne timu uzi alian folion

Afin de mieux connaître ses membres et leurs désirs, et pour mettre en relation les personnes aux intérêts communs, voici un petit questionnaire que vous êtes invité à remplir. Veuillez répondre d'ici la fin de janvier. N'hésitez pas à utiliser une autre feuille, au besoin.

1. Nomo

2. Profesio

3. Naskiĝjaro

4. Interesoj : lingvoj, vojaĝoj, paco, ekologio, komputiko, beletro, aliaj…

Ĉu vi deziras, ke oni rilatigu vin kun aliaj saminteresaj ESK-anoj ?

5. Mi opinias mian Esperanto-scion : nenia, malgranda, sufiĉa, bonega ?

6. Kiel vi eksciis pri Esperanto ? Kiam ?

7. Kial vi lernis Esperanton ? Ĉu viajn celojn vi konsideras praktikaj ( por vojaĝi, ekz. ) aŭ idealaj ( por paco, ekz. ) ?

8. Kiel vi eksciis pri la Esperanto-Societo Kebekia ( E.S.K. ) ?

9. Kiel vi lernis Esperanton ?

10 a. Kiaj vi taksas la servojn de ESK ( reklamado, koresponda kurso, libroservo kaj abonperado ) ?

b. Ĉu EKS donu aliajn servojn ? Kiajn ?

11. Ĉu vi pretus helpi vian Societon en siaj laboroj ? Kiamaniere ?

12. a. Kia vi taksas la Riveregon ? Ĉu vi legas ĝin ?

b. Ĉu enestas tro da franca, da Esperanto ?

c. Ĉu la temoj interesas vin ? Ĉu ni traktu pri aliaj temoj ? Kiaj ?

ĉ. Ĉu estu fotoj, pli multaj bildoj ?

d. Ĉu ĝi estu pli dika, aŭ pli ofta ?

e. Ĉu vi pretas kontribui al ĝi ?

13. Se vi loĝas ekster Montrealo, ĉu vi deziras ekrilati kun la aliaj najbaraj ESK-anoj ?

14. Ĉu vi ŝatus, se E.S.K. iĝus aparta Landa Asocio de U.E.A. ? ( Jam ekzistas simila situacio en aliaj federaj landoj : en Ĉeĥoslovakio, estas Slovaka kaj Ĉeĥa E-A ; en Sovet-Unio, estas Soveta, Latva kaj Litova E-A. )

# Français

1. Nom

2. Profession

3. Année de naissance

4. Champs d'intérêt : langues, voyages, paix, écologie, informatique, littérature, autres...

Voulez-vous être mis en relations avec d'autres membres de la S.Q.E. partageant vos intérêts ?

5. Je considère que ma connaissance de l'espéranto est : nulle, faible, suffisante, excellente.

6. Comment avez-vous été mis en contact avec l'espéranto ? Quand ?

7. Pourquoi vous intéressez-vous à l'espéranto ?
Considérez-vous vos buts pratiques ( pour voyager, par exemple ) ou plus idéalistes ( pour la paix, par exemple ) ?

8. Comment avez-vous été mis en contact avec la Société québécoise d'espéranto ( S.Q.E. ) ?

9. Le cas échéant, comment avez-vous appris l'espéranto ?

10 a. Que pensez-vous des services offerts par la S.Q.E. ( publicité, cours par correspondance, librairie et abonnements ) ?

b. La Société québécoise d'espéranto devrait-elle offrir d'autres services, et si oui, lesquels ?

11. Seriez-vous prêt à aider votre Société dans ses activités ? Comment ?

12. a. Que pensez-vous de *la Riverego* ? La lisez-vous ?

b. Y a-t-il trop de français, trop d'espéranto ?

c. Les sujets abordés vous intéressent-ils ? Quels autres sujets devrait-on toucher ?

d. Devrait-il y avoir des photos, plus de dessins ?

e. Devrait-elle être plus épaisse, plus fréquente ?

f. Seriez-vous prêt à y contribuer ? Comment ?

13. Si vous demeurez hors de Montréal, voulez-vous entrer en relations avec les autres membres de la S.Q.E. dans votre région ?

14. Voudriez-vous que la S.Q.E. devienne une association nationale directement affiliée à U.E.A. ? ( Il existe déjà une situation semblable dans d'autres pays fédératifs : en Tchécoslovaquie, on retrouve une association tchèque et une association slovaque ; en U.R.S.S., en plus d'une association soviétique, il y en a une lituanienne et une lettonne. )

que 18 $. On peut aussi ne recevoir que la première partie du *Jarlibro,* sans la liste des délégués, pour 8 $.

De plus, tous les membres d'U.E.A. âgés de trente ans et moins sont aussi membres de T.E.J.O., branche jeunesse d'U.E.A., mais assez indépendante de celle-ci. Ils reçoivent ainsi *TEJO-Tutmonde,* bulletin bimestriel de l'organisme, et *Kontakto,* trimestriel qui traite de sujets variés, souvent dans une langue destinée aux débutants. On peut aussi s'abonner à *Kontakto* pour 14 $ par an.

Tous les membres de la S.Q.E. à l'aise en espéranto sont invités à devenir membres individuels d'U.E.A., afin de fortifier le noyau central du mouvement espéranto. Vous pouvez contacter la représentante d'U.E.A. au Canada :

Merle Haltrecht-Matte
7083, rue Notre-Dame
Orléans ( Ontario )
K1C 1J1

---

Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

# Rekomendoj pri propraj nomoj

**L'Académie de l'espéranto propose ici des lignes directrices dans la traduction et la translitération des noms propres. Règle principale : chacun choisit ou non son nom espéranto à sa convenance.**

1. La Akademio agnoskas, ke ĉiu ajn rajtas esperantigi sian nomon laŭ sia bontrovo. Ĉiu rajtas ankaŭ elekti pseŭdonimon aŭ plumnomon por si.

2. La Akademio ankaŭ agnoskas, ke ĉiu rajtas konservi sian aŭtentan nomon laŭ la originala ortografio, se nur ĝi estas skribita per Latinaj literoj.

Li tamen devas toleri, ke la specialaj supersignoj aŭ aliaj signoj de lia lingvo eventuale malaperos ; ankaŭ ke lia nomo estos prononcita en alia maniero ol en lia lingvo. [ Sekvas rekomendoj pri la prononco de la ne-Esperantaj literoj, kaj, en tria alineo, pri la transskribo de ne-Latin-literaj lingvoj. ]

4. La Akademio konsilas, ke neniu trudu al aliaj personoj manieron ŝanĝi aŭ transskribi sian nomon eĉ skribe. Propra nomo estas apartenaĵo de ĉiu individuo.

[ El *Monato,* aŭgusto de 1989 ]

---

# Indianaj lingvoj en Kebekio

**Le gouvernement québécois entend protéger les langues autochtones. Il en existe onze au Québec, dont trois ne sont plus utilisées et quatre, parlées par tous les membres du groupe, ou presque ( attikamek, cri, naskapi et inuktitut ).**

Oni foje prezentas Esperanton kiel pontlingvon inter la franclingvanoj kaj la anglalingvanoj en Kebekio kaj Kanado. Sed ne nur tiuj du lingvoj estas ĉi tie parolataj. Plej grandajn rajtojn havas ankaŭ la indianaj lingvoj.

Ekzistas en Kebekio dek unu tiaj lingvoj. Inter ili, tri formortis, foje devige anstataŭitaj de la angla aŭ de la franca. Temas pri la abenaka*, la hurona kaj la malecita lingvoj. Tamen, kvar el ili plene pluvivas, verŝajne ĉar ties popoloj loĝas for de l' blankuloj. Ili estas la atikameka, la krija, la naskapa kaj la inuka.

Meze situas kvar aliaj lingvoj, uzataj de 40 ĝis 70 procente de l' popolo : la algonkena, la mikmaka, la mohaŭka kaj la innua ( montagnais ). Vivas entute pli ol 50 000 indianoj en Kebekio. Plej multaj estas la Mohaŭkoj, la Innuoj kaj la Krijoj.

La Kebekia registaro deziras plivigligi la indianajn lingvojn. Ĝi agnokas la Indianojn kiel apartajn popolojn, kaj eĉ pretas doni monon... Ĝia agado baziĝas sur tri principoj : la indianaj popoloj havas unuan respondecon protekti siajn lingvojn kaj kulturojn ; ĝi helpos tiujn, kiuj deziras lerni indianan lingvon ; ĝi taksas tiujn lingvojn egalaj, sed pli zorgos pri la plu vivantaj.

Tamen, la registaro substrekas la neceson por la Indianoj pli multe uzi la francan, ĉefan lingvon de Kebekio. Eble iamEsperanto...

Sed ĝi devus unue enkondukiĝi inter Indianojn. Kiel ni faru ?

[ Laŭ *Rencontre*, septembro de 1989 ]

---

* La redaktanto devis trovi multajn novajn nomojn, eble ne ĉiam plej bonajn. Proponoj bonvenas.

# Nouveaux espoirs en Asie

Joachim Werdin
résumé et traduit par Cyrille Robidoux

Durant les dernières années, plusieurs espérantistes ont voyagé dans les pays d'Asie, rencontrant les espérantistes locaux ; ils réussirent en partie à raviver ou à créer des associations et des mouvements espérantistes dans certains de ces pays. On peut citer en exemple le cas de l'espérantiste américain Joel Brozovsky qui, entre 1984 et 1987, a fait le tour du monde et collaboré de près avec des espérantistes du Japon et de la Corée pendant plusieurs mois.

Non moins intéressant est le voyage que vient de terminer l'espérantiste polonais Joachim Werdin, qui a visité notamment la Turquie, le Pakistan, l'Inde, le Népal, la Malaisie et Singapour. Il a fait d'intéressants rapports sur la situation de l'espéranto dans ces pays. Nous présentons ici un court extrait de ces rapports.

## Turquie

Mon séjour de dix jours à Istanbul a été rendu possible grâce à la collaboration d'un espérantiste débutant, Can Zamur, et à sa famille. Le mouvement espérantiste en Turquie est presque inexistant. Mon hôte, Can Zamur, étudie l'espéranto depuis sept mois, il n'est pas actif dans le mouvement espérantiste de son pays quoiqu'il aimerait y mettre un peu de son temps. Il commencera plutôt par s'impliquer dans l'Association de Tourisme espérantiste ( Esperanta Turismo ) qui progresse assez bien. J'ai rencontré ensuite Enver Yalçin, un membre de Monda Turismo, qui aimerait organiser le Congrès mondial de 1994 à Istanbul. En visitant le président de la Turka Esperantista-Asocio, Hayrettin Dural, j'ai constaté que durant les dix dernières années, il a été le seul qui ait fait quelque chose pour le mouvement espérantiste et que, malgré son âge avancé, il est disposé à continuer. En parlant avec les gens d'Istanbul, j'ai eu le sentiment qu'ils apprendraient volontier l'espéranto s'ils en avaient la possibilité et s'ils avaient plus d'information sur la langue internationale.

## Pakistan

Je suis demeuré presque un mois au Pakistan et j'ai visité des espérantistes dans les villes de Multan, Lahore, Jhelum, Ravalpindi et Muree. Le siège de la Pakistana Esperanto-Asocio se trouve à Multan. C'est dans cette ville que l'on trouve le groupe d'espérantistes le plus important. On y tient régulièrement des rencontres et des cours d'espéranto y sont donnés régulièrement. Malheureusement après le cours de base, les étudiants ne progressent plus, faute de matériel adéquat de niveau intermédiaire et avancé. À Lahore, on trouve quelques espérantistes, mais ils ne se rencontrent pas, n'organisent pas de cours et ne font aucune publicité, ce qui amène les gens de

la région à ne voir aucune utilité dans l'espéranto. Ils préfèrent donc se perfectionner en anglais, qui est une langue très utilisée dans le pays. À Jhelum, on a organisé des cours pour débutants, séparés en deux groupes : un groupe d'hommes et un groupe de femmes, puisque dans les pays islamiques, il est interdit aux hommes et aux femmes de suivre de tels cours ensemble. C'est peut-être ce qui explique que, dans la Pakistana Esperantistaro, il n'y ait que des hommes.

À Ravalpindi, j'ai rencontré Saeed Ahmad Farani, un des espérantistes les plus connus. Il a fait écrire des articles sur l'espéranto dans les journaux et on peut le voir à la télévision et l'entendre à la radio. Il a aussi édité des livres en et sur l'espéranto, et il a fondé la Esperanta Pangaba Akademio. Enfin à Muree, petite ville près d'Islamabad, on trouve une maison de l'espéranto ainsi qu'un restaurant espérantiste. C'est aussi le lieu de rencontre d'été de la Pakistana Esperanto-Asocio. Sur les 90 habitants de Muree qui se disent espérantistes, seulement 20 peuvent parler la langue. Comme en Turquie, il est certain que beaucoup de gens apprendraient l'espéranto s'ils en avaient la possibilité. Mais là aussi on manque d'information sur la langue internationale.

## Inde

Je suis demeuré cinq semaines en Inde, mais je n'ai visité que Delhi, Calcutta et Bangalore. À Delhi, j'ai trouvé quelques espérantistes formés il y a 20 ans par la Hinda Instituto de Esperanto, qui à cette époque était un des centres d'espéranto les plus actifs d'Asie. Aujourd'hui ces espérantistes ne sont plus actifs, quoiqu'ils parlent encore la langue. Calcutta est le siège de la Federacio Esperanto de Bharato. On peut y suivre des cours d'espéranto l'année durant. Des cours sont offerts dans trois autres centres espérantistes, dans des petites villes en banlieue de Calcutta. Présentement, dans la région de Calcutta, on compte plus de 500 finissants. Dans un village près de Calcutta, j'ai rencontré une famille d'espérantistes dont tous les membres parlaient très bien la langue. La fille, Savona, compose des chansons et des poèmes en espéranto et son père Prithwis enseigne la langue aux villageois. Les espérantistes de Calcutta sont très actifs et ont d'ailleurs des rencontres chaque semaine.

À Bangalore, la Bangalora Esperanto-Centro fut fondée après deux semaines de cours que j'ai moi-même dirigés. Cinquante-six personnes ont terminé le cours et aimeraient maintenant correspondre, recevoir des conseils et du matériel d'apprentissage. Voici l'adresse du centre : Bangalora Esperanto-Centro, S.S., Pradhan 97, 24 th cross, 111 Block east, Jayanagar, Inde Bangalore, 560011.

## Népal

Je ne suis resté à Katmandou que cinq jours et je me suis entretenu avec quatre espérantistes. Il y a trente ans Tibor Sekelj est venu au Népal pour initier les Népalais à l'espéranto. Après, Simo Milojevic ( sous les auspices d'U.E.A. ) est venu au Népal pour les mêmes raisons. Après son départ, il y avait une centaine d'espérantistes, mais peu de temps après, le mouvement espérantiste s' est affaibli et aujourd'hui n'existe presque plus. Il manque des forces fraîches. J'ai visité une école et j'ai parlé de l'espéranto aux étudiants, l'accueil a été plus que favorable et ils ont même réclamé que les cours commencent immédiatement. Comme dans les autres pays, les gens appuient l'idée d'une langue neutre et internationale, il y a même un vif intérêt. Même la presse locale est prête à informer les gens sur l'espéranto ; on attend seulement qu'un professeur vienne donner le cours .

## Malaisie

En arrivant à Kuala Lumpur, j'ai rencontré le seul espérantiste de la ville. Il a appris la langue en 1981 à Rotterdam, nous avons pu parler lentement en espéranto. Un autre espérantiste du nord du pays m'a contacté par lettre, mais il m'a écrit en anglais, ce qui n'est guère surprenant car en Malaisie on parle cette langue dès l'enfance, tandis qu'il est pratiquement impossible de pratiquer l'espéranto. Le premier mai 1989, une trentaine de finissants d'un cours intensif se sont rassemblés et ont fondé la Malajzia Esperanto-Asocio.

## Singapour

En arrivant à Singapour, j'ai essayé d'entrer en contact avec quelques-uns des espérantistes dont le nom figure dans le livre d'adresse d'U.E.A. J'avais écrit à ces personnes avant mon voyage, mais je n'avais reçu aucune réponse. J'ai pu rencontrer quatre d'entre elles, dont deux pouvaient s'exprimer en espéranto. Je me suis rendu compte qu'il n'existait pas de mouvement ou d'association espérantiste dans le pays. Après quelques articles et annonces dans les journaux, il est apparu clair qu'une foule de gens voulait apprendre la langue. Le 15 mai, les cours commençaient et plus de 200 personnes, divisées en quatre groupes, y assistèrent. La Singapura Esperanto-Asocio fut fondée le 27 mai 1989. Elle compte actuellement 120 membres et on croit que le nombre de membres pourrait croître rapidement. En Malaisie ce n'est pas les moyens ou le matériel didactique qui manquent, c'est plutôt l'expérience et la connaisance du mouvement espérantiste qui leur fait défaut.

---

# Raporto pri la ESKa aŭtuna renkontiĝo

de Patriko Monĵo

À Ottawa, une poignée d'espérantistes se sont donné une poignée de main pour exprimer la complicité avec laquelle ils entamaient la rencontre automnale de la Société. Le feu qui les animait n'est pas encore éteint ; nous espérons le retrouver au printemps.

Oktobras. Kunvenas manpleno de esperantistoj. Ĝoje revidi unu la alian, malĝoje tiom malmulti, kvankam pli bone etosi familie ol amase. Diskutante, ludante, restoraciante, sed jen pli detale.

Kelkaj Ontarianoj, ĉar estis samtempe la kongreso de Ontaria Esperanto-Asocio, kaj pluraj Kebekianoj renkontiĝis. Krome ĉeestis du vizitantoj el Kalifornio. En Otavo situas centro en kiu estis aranĝitaj la programeroj. El la programeroj, mi citu Esperanto-kurson, kiun gvidis Normando Fleury, konversaci-grupon por progresintoj pri vojaĝoj kaj aliaj temoj, kiun gvidis Sana Metz, kadro-kurson por aktivuloj pri « Kiel partopreni kunvenon » kaj debaton por aktivuloj pri « Ĉu Esperanto estas taŭga intergenta komunikilo en Kebekio kaj Ontario ? », kiujn gvidis Manŭelo Kampanjaĥa, kaj naĝadon por junaj familioj, kun aŭ kun [ tiel, la red. ] bankostumo.

Ankaŭ estis tempo por viziti muzeojn. Tiam la partoprenantoj iom dise promenis, ĉiu elektante inter pluraj interesaj vidindaĵoj de la ĉefurbo. Elekti eblis ankaŭ manĝtempe, inter mempreparado, memserva restoracio aŭ restoracioj zorgeme elektitaj de la organizanto Manŭelo.

Tempon por ludi ni havis, tempon por krii infane, kaj tempon por esti intervjuata de Patriko por lia *Papago*.

Tranokte la Otavanoj kaj ĉirkaŭanoj hejmis, dum preskaŭ ĉiujn aliajn kolektis en sian hejmon Usonano ! Tiu feliĉe ne perdigis nian tempon vojaĝe, ĉar li momente loĝas en Nipiono ( apud Otavo ).

Ĉu mia raporto ne logas vin por la venonta renkontiĝo ? Se jes, ne forgesu venonte kunnii. Se ne, mi tre bedaŭras ne esti bona raportanto, kaj konsilas al vi mem sperti venonte! Ĉu ankaŭ vi printempos ?

---

## Klube

*La Riverego* ricevis neniun informon pri la Esperantaj agadoj en Montrealo, Ŝerbruko kaj Kebeko. Espereble io tamen okazos dum la venontaj tri monatoj. Montrealanoj kontaktu Silvanon Quirion, je 522. 4308

# *Jen la vent'*

Pasintan someron, iun tagon, dum mi biciklis al la Internacia Junulara Kongreso, en Kerkrade ( Nederlando ), estis multa vento. Tial mi ekkantis *V'là bon vent*. Kunbiciklanto trovis la kanzonon bela, kaj ni decidis traduki ĝin en Esperanton ĉe la I.J.K. Tiel estis. Iun nokton, eble iom rapide, kvaropa teamo plenumis tiun taskon. Mi ofertas ĝin al vi. La muzikon vi esperebleble konas. Ĝi estas tradicia.

La kvaropo konsistis el : Mike ( Majk ) Sadler, el Britio kaj kelkaj aliaj lokoj, kiu bicikle proponis la tradukadon ; Yves Bellefeuille, el Otavo ; Eva Formaggio el Italio, Hungario kaj F.R.G. ; kaj Sylvain Auclair, verkinto de tiu ĉi enkonduka teksto.

Jen la vent', jen bona vent'
Vokas mia amikino

Jen la vent', jen bona vent'
Nun atendas amikin'

En bela lag' ĉe mia dom' (2X)
Naĝadas anasetoj tri

Jen la vent'...

Naĝadas anasetoj tri
La Princ' foriras al ĉasad'
En man' pafilo el arĝent'
Anason nigran celis li
Ĥo ve ! La blankan trafis li
Reĝido, ja kruelas vi
Formortas bela anaset'
El la flugilo fluas sang'
Kaj diamantojn ploras ĝi
Elbekas oro kaj arĝent'
La plumoj flugas en la vent'
Kolektas ilin damoj tri
Tiel ekestos mola lit'
Por la vaguloj servu ĝi

Eh tiens ! pourquoi pas donner aussi le texte en français ?

V'là l'bon vent ! V'là l'joli vent !
V'là l'bon vent, ma mie m'appelle
V'là l'bon vent ! V'là l'joli vent !
V'là l'bon vent, ma mie m'attend

Derrière chez nous, y a un étang
Trois beaux canards s'en vont baignant
Le fils du roi s'en va chassant
Avec son grand fusil d'argent
Visa le noir, tua le blanc
O fils du roi, tu es méchant
Tu as tué mon canard blanc
Par-dessous l'aile, il perd son sang
Par ses yeux sortent des diamants
Et par son bec, l'or et l'argent
Toutes ses plumes s'envolent au vent
Trois dames s'en vont les ramassant
C'est pour en faire un lit de camp
Pour y coucher tous les passants.

# *la Riverego*

Esperanto-Societo Kebekia
Vintro de 1989-90. Nro 17-a.

Ĉi-numere :
*Jen la vent'*
Pri la aŭtuna renkontiĝo
Nouveaux espoirs en Asie
Indianaj lingvoj en Kebekio
Questionnaire Demandaro
Association mondiale d'espéranto

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8